

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

dimanĉon, la 30-an de Junio, 2013 • numero kvin


Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 atm – tagmezo:
Lecionoj

★ 2 – 3 ptm:
Ĵenja parolas pri sia
teatraĵo-projekto
Flowe, unua etaĝo

★ 6:00 ptm – ?: Futbalspektado
Finley, dua etaĝo
Young-Long invitas vin spekti matĉon
kun li (vidu anoncon dekstre!)

★ 7:30 – 8:30 ptm:
Fabjo prezentas kelkajn filmetojn
Flowe, unua etaĝo



Anoncoj

Puraj tukoj venos lundon

Lundon matene, antaŭ ol vi iros al via leciono, metu viajn malpurajn litotukojn, bantukojn kaj mantukojn ekster via ĉambro. Iam dum la mateno aperos puraj tukoj sur ĉareto apud la vestolavejo en la dua etaĝo.

Clean towels arrive on Monday

Monday morning before you go to class, put your dirty sheets and towels outside your room. There will be clean towels and sheets on a cart on the second floor sometime in the morning.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Spektu mojosajn E-filmetojn ĉi-vespere!




Hodiaŭ je la 7-a ptm, Fabjo prezentos al ni iom pri sia Esperanta projekto. Temas pri “Globeto – Interreta Televido”, kiu estas rubriko ĉe la interreta paĝaro YouTube, kie li publikigas filmetojn kaj raportojn en Esperanto aŭ pri Esperanto. Globeto ne estas oficiala, movada, ŝtata, aŭ ligita al ia specifa Esperanta entrepreno. Komence ĝi estas simpla kaj modesta projekto, tute sendependa kaj iom privata, ĉar ĝi estas farita de sola esperantisto, kiu ŝatas raporti per filmoj.

Fabjo estas profesia ĵurnalisto, kiu kutime laboras ĉe radistacio, televidstacio kaj ĵurnalo en la urbo Fortaleza, situanta en nord-

orienta Brazilo. Hazarde, pro sia laboro li ekkonis Esperanton dum Aŭgusto 2009, kaj post iom da monatoj jam fariĝis konvinkita esperantisto. Eble li pli bone rakontos pri tio ĉi-vespere...

Aldone, Fabjo promesas montri la unuan reklam-filmeton pri la 2014-a IJK. La 70-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Brazilo venontjare, kaj nuntempe li partoprenas en la loka kongresa komitato kaj tial li posedas privilegiajn informojn... Venu por malkovri ilin! Fabjo ŝatus inviti kaj varbi NASK-anojn al tiu grava internacia kongreso. Ne maltrafu!

Piedpilka ĉampioneca matĉo: Brazilo k. Hispanujo



Brazilo: 2-foja defendanta ĉampiono de la Konfederacio-Pokalo, kontraŭ...

Hispanujo, nuna defendanta ĉampiono de la Mondo-Pokalo!

Hodiaŭ, ekde la 6-a ptm, Brazilo kaj Hispanujo batalos por la Konfederacio-Pokalo. Ĝi estas la ĉampioneca matĉo de la Konfederacio-Pokalo inter tiuj nacioj, kiuj reprezentas siajn FIFA-konfederaciojn.

Alinome “antaŭ-Mondo-Pokalo”, la Konfederacio-Pokalo nun okazos en Brazilo, la lando kie Mondo-Pokalo (kaj IJK!) okazos en venonta jaro.

Young-Long invitas vin al la komuna ĉambro en la 2-a etaĝo de nia loĝejo por spekti la matĉon kune. Venu, rigardu, poru kaj kontraŭu!

Kien forĵeti rubon? “For” ne ekzistas!

de Julie SPICKLER

Kion fari pri uzablaj objektoj, kiujn ni ne plu uzas, sed volas forĵeti respondece? Kion mi faros pri la ludilo, kiun mi aĉetis sed neniam uzas, aŭ la restantaj dosierujoj en la pakajo de 20, el kiu mi bezonis nur tri?

En mia urbo ekzistas grupo nomita *Freecycle* – vortludo pri *recycle* (“recikligi”) kiu aldonas la kroman ideon de “senpage donaci”. Oni povas aŭ peti aŭ oferti ion ajn, kiun oni povas uzi aŭ donaci al alia uzonto, pere de retmesaĝo en *Yahoo*-grupo.

Per tio mi ricevis son-surbendigilon,



ŝtupareton, kaj elektran horloĝon; mi fordonis la supre menciitajn aĵojn kaj aliajn. Tiel mi ŝparis monon, helpis aliajn ŝpari monon, kaj spertis la memgratulan senton de ne aldoni al la rubejo utilaĵojn.

Kaj mi kompreneble penas recikligi paperon, vitron, metalon, plaston, ktp., laŭ la urba programo, kaj mi frekventas la brokantejon. Ĉar kiam oni forĵetas ion ajn, ĝi iras ien – “for” estas koncepto, ne estas vere loko!

Langvoro

de Maria Nazaré de C. Laroca

L’ amfor’ de l’ memor’
Ankoraŭ lirle verŝas
La vinon de Amor’,
Kiu soifas verse.

Kaj la Poet’ plonĝas
En ŝtorman ombron
De l’ nuda anim’,
Por elŝovi ŝpare
Lumfaskon el feliĉ’.

La vivo mem estas poemo

de Prof. Rikardo Salazar CRESPO

Plenplena je surprizo,
amemo, riskoj,
Ekde profunda antikveco
Revoj belaj, lumaj ideoj,
suferaj krioj.
Sed kiel reĝo regante
plenpova.
Supera sento
deviganta ĉiujn,
Regas la terglobon,
Murdas kaj vivigas,
Estas **la amo**,
la plej forta el ĉio
Kio hodiaŭ devigas min
Senĉese pensi pri feino
Kiel rozo el Aprilo.

Senintencaj esperantaĵoj apud la kampuso

Ĉu vi rimarkis, kiom da ŝildoj apud la kampuso enhavas tute bonajn vortojn en Esperanto?

Ĉu nur koincido? Aŭ ĉu la Raleigh-anoj sciis, ke iam venos al la universitato grandaj grupoj de Esperanto-parolantoj?

Jen io, kiun via redaktisto trovis ĵus hodiaŭ, nur cent paŝojn for de nia loĝejo...



José Antonio montras sian loĝlokon sur granda terglobo ekster la Muzeo pri Naturscienco.